# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc-Roussillon»

5, Quai Vauban, **PERPIGNAN** (P.-O.) - Telefono 34-38-84

-o-o-Numero 9a-o-o- §/§ BONAN KAJ FELIĈAN NOVJARON ! §/§ -o-o-Ia Trimestro 1963-o-o-


## MODERNA U. E . F . = U.F.E.

Por la dua fojo U.F.E. ricevis la apogon de la Nacia Edukada Ministerio por la Paska Kultura Semajno en Gresillon ! kaj povas inviti 50 gejunulojn estontajn geinstruistojn !

Por la unua fojo en Francujo Esperanto eniras en 70 lernejojn !

Konsekvence la nombro de la membroj de nia Unio kreskas ĉiutage !

Antaŭen ! Ĉiam amike kaj tolereme !

## NIA NACIA PREZIDANTO PRELEGIS EN QUILLAN (Aude)

Mardo, la I8 an de decembro, prezidanto René Llech-Walter prelegis pri Esperanto antaŭ 80 junulinoj ĉe la ŝtata lernejo "La Forge" en Quillan. Post la prelego la direktorino akceptis la malfermon de kursoj. S-noj Regnier kaj Bijeire gvidos la kursojn.

## § GRAVAJ SUKCESOJ EN ORIENTAJ PIRENEOJ §

I97 gejunuloj vizitas la esperantajn kursojn en 6 ŝtataj lernejoj; ĉe la Metia lernejo en Espira-de-l'Agly la direktorino decidis ke la esperantaj kursoj estos devige ek de Oktobro I962 kaj ke la notoj influos por la ĝenerala klasado.

## PERPIGNAN FESTIS LA DATREVENON DE D-ro ZAMENHOF

Poemoj de Baudelaire kaj Esope diris, en esperanto, nia juna samideano Robert Lloancy helpanto de S-ro Llech-Walter por la esp. kursoj ĉe Liceo "Arago" kaj partoprenintc de la lasta Forumo de la Junularo en Romo. La Direktorino de la Metia lernejo en Rivesaltes permesis al la junulinoj kiuj vizitas la esp. kurson ĉeesti la feston sub gvidado de du instruistinoj. La "Gajaj Trobadoroj" ludis "La Esperon" kaj donis poste"gajan noton"dum tiu amika vespero. La ĉeestantoj povis admiri la novan belegan ekspozicion kun sonbendo de S-noj Lentaigne kaj Capus kies diverskoloraj diapozitivoj estas vere "mirindaĵo". Belega metodo por la disvastigo de la lingvo. Parolis pri nia kara Majstro nia nacia prezidanto kaj S-ro Charles Grando, delegito de la literaturaj kaj sciencaj asocioj, tostis je la gloro de la internacia lingvo. Deklamis ankaŭ nia kara Bofilo (Robert Gendre)

## VENU AL PERPIGNAN POR PENTEKOSTO I963 !

Alloga programo! Akcepto ĉe fama ceramikejo "Sant-Vicens", Coblas, Sardanoj, gustumado de la fama vino "Banyuls" dansoj ! La "Gajaj Katalunaj Trobadoroj ! La arta trupo de U.F.O. L.E.A kaj ...la ekskurso al Hispanujo tra la Costa Brava.... kaj tamen gravaj laboraj kunvenoj. Filatelistoj atentu ! Speciala stampo! Speciala tago !

"Franca Esperantisto" kaj "Kulturaj Kajeroj" enhavos la aliĝilojn.

## LASTA PETO : SENDU RAPIDE VIAJN KOTIZOJN

Laŭ la novaj statutoj se vi loĝas en : Pyrénées-Orientales, Aude, Hérault,Gard kaj Lozère vi devas sendi viajn kotizojn al "Fédération d'Esperanto "Languedoc-Roussillon" C.C.P. 956-28 Montpellier. Vi ricevos tuj viajn membrokartojn kaj jarajn vinjetojn.

Junuloj, studentoj, membroj de lernejaj kluboj (Club Esperanto) jare: 2 F. (ricevas trimonata bulteno franclingve) Plenkreskuloj: 3 F. Aktivaj membroj,ricevas Franca Esperantisto: junuloj:6F; plenkreskuloj:I2F. (Jara kotizo=Federacio - U.F.E. kaj U.E.A.)

Kaj se vi deziras helpi nin aldonu, jare, I F. por abono al "Sudfranca Stelo".Dankon !

## PASKA KULTURA SEMAJNO I 9 6 3

Dorse vi legos la belegan programon realigita de nia moderna U.F.E. por la grava Kultura Semajno de la Ia ĝis la 7 a de Aprilo I963 en nia bela Kastelo Gresillon !

FRANCA UNIO POR ESPERANTO

P R O G R A M O de la K U L T U R A S E M A J N O, P A S K O 1963

KASTELO de GRESILLON

Baugé (Maine et Loire)

Dimanĉo 31/3 : Alveno de la partoprenantoj

Lundo 1/4 : 9h Interkona Kunveno.
17h Sro RIBOT : "Konsiloj por la propagando en la lernejaj medioj" - Modelprelego -
21h Sro BLANC : "Mediteranea Hispanio" (per diapozitivoj kun sonbendo sinkronigita)

Mardo 2/4 : 9h Dr. ALBAULT:"Kion oni sciu pri la okulo kaj ties malsanoj"
11h Dr. LAPENNA:"Fundamentoj de la Publika parolarto".
17h Inĝeniero MICHLING : "Gottingen" Universitata Urbo kaj "Gauss" fama germana matematikisto.
21h Sro BLANC : "Aŭstrio, mirinda juvelo el Centra Eŭropo" (per diapozitivoj kun sonbendo sinkronigita)

Merkredo 3/4 9h Sro GARRIGUE : "Historia Provenco".
10h Sro LAPENNA : "Formiĝo de grandaj komunaj lingvoj"
17h Sro MOTILLON : "La internacia vokacio de Turanĝio" (per diapozitivoj)
21h Sro ROUSSEAU : "Malmö- Parizo- ilustrita vojaĝvojo.

Jaŭdo 4/4 : - Vizito de Baugé -
17h Sro GARRIGUE: "Beletra Provenco".
21h Sro ROUSSEAU: "De la Vistulaj bordoj al la Nebuloj de Skotlando" (per diapozitivoj)

Vendredo 5: 9h Sino CHEVERRY: "Anjou, en la vivo kaj verkaro de Rabelais". La vera historio de la Damo de Montsoreau".
10h Sro THIERRY : "Ĉu drama lingvo aŭ lingva dramo ?"
17h Sro FRANGEUL: "Cigana Rapsodio"
21h Sro PETIT: "La sukceso de la Foruno de Romo"(Sonbendo, diapozitivoj, filmo)

Sabato 6/4 9h Sro MOTILLON: "Rabelais- Vivo kaj verkoj- Lia influo".
10h Sro LLECH-WALTER : "La rekta kaj Ora metodoj"
11h Sro Inĝeniero DETTWILLER: "Signifio de Eŭratoma organizo en la Eŭropo unuigo".
14h Verkado de la raportoj pri la Kultura Semajno fare de la staĝantoj.
17h Konkludoj.
21h Sro GUILLAUME : "Britujo antaŭ la komuna Merkado".

Dimanĉo 7/4 : Ekskurso al la kasteloj de la Loire; vizito de Chinon kaj naskiĝdomo de Rabelais.